



la infopmilo

informbulteno pri esperanto

BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCO

Editeur : Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République - NANCY -

trimestriel
Nouvelle série

N°7

3e trimestre 1974



Abonnement

Un an : 5F

1e N° : 1,25 F

(1 jaro : 6 internaciaj
respondkuponoj)

★ CE QU'ILS PENSENT DE L'ESPERANTO...

★ M. Giscard d'Estaing : "... Le problème que vous soulevez est complexe. Comme vous le savez, l'anglais tient en fait à l'heure actuelle la place que vous voudriez voir accordée à l'espéranto. En outre cette question ne peut être abordée à un niveau exclusivement national, il m'est donc impossible de vous donner pour le moment une réponse plus précise..."

★ M. François Mitterand : "... J'ai lu votre lettre avec intérêt. Par tradition et par vocation le Parti Socialiste est, vous le savez, résolument internationaliste. Tout ce qui favorise le rapprochement entre les peuples et qui permet une meilleure compréhension internationale ne peut que recevoir mon total soutien. C'est vous dire avec quelle sympathie mes amis et moi suivons depuis longtemps l'action que vous menez en faveur de l'Espéranto.

L'enseignement de cette langue correspond à un idéal de communication et d'amitié entre les peuples par delà les barrières des langues et des races. Nous sommes donc tout à fait partisans d'un tel enseignement et d'une aide de l'Education Nationale permettant sa diffusion.

Il y a encore, je le sais, bien des habitudes à vaincre et des réticences à surmonter. Mais avec votre appui, je suis sûr que nous y parviendrons..."

★ DEUX NOUVELLES EDITIONS EN ESPERANTO...

Un roman célèbre : Déjà traduit en plus de 10 langues, le chef-d'oeuvre de Bruno Apitz "NU PARMIL LES LOUPS" - "Nackt unter den Wolfen" - vient d'être édité en langue internationale. Cette odyssée d'un jeune enfant israélite polonais que ses compatriotes, aidés de quelques Allemands, essaient de sauver de l'enfer du camp de Buckenwald restera dans la littérature l'un des réquisitoires les plus sévères contre l'homme devenu fauve. Un livre à lire...

Un dictionnaire commercial multilingue : Rédigé en anglais, espéranto, allemand, espagnol, français, portugais et suédois, cet ouvrage destiné aux "techniciens" du commerce au sens le plus large du terme ne peut manquer d'intéresser le lecteur curieux, soucieux d'accroître ses connaissances... commerciales et linguistiques !

★ A TRAVERS L'EUROPE à BICYCLETTE GRACE à L'ESPERANTO !

Originnaire de Sheffield (G.B.) un fervent amateur de la "petite reine", espérantiste de surcroît, vient de visiter la France. Son livre de bord est éloquent : plus de 240 000 km dans cinq pays... et des contacts humains irremplaçables par le biais de la langue internationale.

UNE INITIATIVE CULTURELLE DE RADIO-BERNE

Durant le mois de Juin, la radiodiffusion helvétique a présenté une série d'émissions en espéranto dont le thème central se rapportait à l'art pictural en Suisse. Rappelons que Radio-Varsovie, de son côté, fait connaître à tous ses auditeurs espérantophones, et ce depuis plusieurs années, les activités et les réalisations de tous les grands artistes polonais, passés et contemporains.

DES ACADEMICIENS SOVIETIQUES SE PRONONCENT POUR L'ESPERANTO

Un article intéressant vient de paraître dans la revue spécialisée de la section sibérienne de l'Académie des Sciences d'U.R.S.S. "Za nauku v Sibiri". Au cours d'un débat portant sur la nécessité d'un idiome commun susceptible de favoriser la diffusion des informations scientifiques, les participants se trouvèrent confrontés au problème suivant : quels sont les critères à retenir pour le choix d'une telle langue ?

La langue parlée par le plus grand nombre d'hommes est le chinois. La langue officielle utilisée par le plus grand nombre de pays est l'espagnol. C'est en russe que l'on trouve la plus grande quantité d'ouvrages scientifiques édités annuellement : plus de 30 000. Quant à l'anglais il constitue le support linguistique de plus de 2 400 titres de journaux ou revues, totalisant 96 millions d'exemplaires... Les participants à ces assises ont tranché "scientifiquement" : seul l'espéranto peut s'avérer le moyen idéal dans ce domaine.

LES ACTIVITES DU CENTRE CULTUREL INTERNATIONAL ESPERANTISTE DE GRESILLON (Maine et Loire)

Comme chaque été, des Espérantistes de l'Enseignement vont se retrouver dans le cadre reposant et l'ambiance amicale de leur château. (8 au 21 Juillet) Thème général choisi cette année : "Echanges d'expériences d'enseignement des Langues".

A peine ce stage sera-t-il terminé que commencera, à la Maison Internationale de SONNEBERG dans la forêt du Harz, la conférence de la Ligue Internationale des Instituteurs Espérantistes, qui étudiera des expériences modèles d'enseignement de l'espéranto ; à ce thème s'ajouteront des débats sur la situation des travailleurs immigrés en Europe, vue principalement du point de vue des difficultés linguistiques qui se posent à eux et à leurs enfants.

L'ESPERANTO A LA TELEVISION SOVIETIQUE ET TCHECOSLOVAQUE

L'émetteur TV du centre des Carpates a consacré l'une de ses émissions à une revue de la presse espérantiste. Par ailleurs un cours d'Espéranto est diffusé depuis la fin du mois de mars par la station de Bratislava.

UN COURS D'ESPERANTO DONT ON PARLE

Il s'agit de l'ouvrage de J.Thierry "L'espéranto sans peine" que la célèbre firme Assimil vient de présenter successivement à la Foire du Livre à Bruxelles et à l'Exposition Internationale DIDAKTA dans la même ville. Cette méthode, alliant le livre, le disque ou la cassette est actuellement la seule de cette importance sur le marché de l'édition didactique.

LE DOCTEUR ZAMENHOF et la GRAPHOLOGIE

Dans la série "le langage des écritures" le journal toulousain "La Dépêche" vient de publier une étude graphologique d'un manuscrit du créateur de l'espéranto, on y relève en particulier cette phrase : "Lorsque les peuples auront la faculté de se comprendre en toute liberté, ils cesseront de se haïr".

UN AVION " ZAMENHOF "

La Compagnie aérienne polonaise LOT vient de donner le nom de "Zamenhof" à l'un de ses quatre plus gros appareils actuellement en service.

ERRATUM : Une coquille malencontreuse, pour laquelle nous prions nos lecteurs de bien vouloir nous excuser, s'est glissée dans notre dernier bulletin d'informations. C'est le département du Pas-de-Calais et non celui du Nord qui a à son tour voté une motion en faveur de l'espéranto.

Tekstojn por la Informilo n°8 vi bonvolu sendi antaŭ la 1a de oktobro al Sr° COLNOT
15 rue de Lavaux 54520 LAXOU - DANKON!

NI JAM PREPARU LA VENONTAN KURS-SEZONON!

De du jaroj mi arde alvokis ĉiujn niajn aktivulojn -kaj ankoraŭ pli la ne-aktivulojn!- por ke ili klopodu varbi lernantojn kaj krei kursojn en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, kie troviĝas kapablaj samideanoj.

La rezultoj de tiuj alvokoj verdire ne estas speciale brilaj: se la reto de la kunlaborantoj por nia koresponda kurso ankoraŭ pligrandiĝis (nun 18 personoj) per kunlaboro de S-ino LOUTERBACH (ste-Marie aux Mines), S-ino LERDING (Pfastatt), S-Ro CLAUDEL (Bruyères) kaj S-ro Kubler (Roderen-Thann), la solaj novaj parolaj kursoj okazas en St-Dié (88) dank' al S-ro GODART, en Nitting (57) dank' al S-ro GROSJEAN, kaj en Ste Marie-aux-Mines dank' al S-ro MIQUEL. Sed kmpense (!) la kursoj planitaj en St-Louis, Colmar kaj Mulhouse ne okazis!

NUN BONVOLU ATENTI: mi petas ĉiujn aktivulojn en Bar-le-Duc, Colmar, Epinal, Mulhouse, Nitting, St-Dié, St-Louis, Ste-Marie aux Mines, Strasbourg Thann, bonvoli informi min, antaŭ la fino de septembro, pri la kursoj, kunvenoj, ktp, kiujn ili planas por la nova lern-kampanjo 1974/75. Tiuj informoj aperos dum oktobro en la Informilo N° 8, mi mem raportos pri Nancy. Informu eĉ se viaj kursoj estas nur projektoj. Vi NE ricevos memorigan cirkuleron pri tio, bonvolu do ne forgesi raporti ĝustatempe.

Mi ankaŭ alvokas la personojn kapablajn gvidi kursojn en BREITERBACH, BUHL, CHATEAU SALINS, DIDENHEIM, GUEBWILLER, HUNDLING, HUNINGUE, ILLKIRCH-GRAFFENSTADEN, LAUTERBACH, LIEPVRE, METZ, PFASTATT, THIONVILLE, SELESTAT, VITTEL, ke ili laŭpove vekigu kaj konsentu iom labori por nia komuna afero, kreante kaj gvidante dum la proksima ĉernjaro parolan kurson. Ĉiu el ili bonvolu senti sin koncernata per tiuj linioj, ĉar mi ne povas konstante skibi personan leteron al ĉiu. La progreso, la fina venko de Esperanto, dependas de ni ĉiuj (do de vi!) kaj ne de la laboro de nur kelkaj el ni!

Pripensu tion kaj tamen travivu ripozigajn kaj suplenajn feriojn!

La prezidanto: J.P. COLNOT

NIA AGADO POR INFORMADO SUR LA FEDERACIA TERITORIO

Tiu agado ligiĝis parte kun la opinio-sondo, parte kun la propagando por la kursoj, perkoresponda kaj parolaj.

Unue ni eldonis 1000 demandarojn kaj aĉetis 1000 flugfoliojn pri Esperanto. Ni provizumis per ili diversajn aktivulojn kaj respondis al ĉirkaŭ 300 unuopaj informpetoj (al kiuj ni samtempe dissendis cirkulerojn pri la perkoresponda kurso kaj pri la abonoj, kotizoj al Esperanto-gazetoj kaj asocioj, ĉi lastaj eldonoj pagitaj per la kaso de la perkoresponda kurso).

Poste dum februaro ni denove eldonis 300 cirkulerojn kun diversaj informoj por lerni Esperanton (i.a. pri "ASSIMIL") kaj 300 prov-informilojn (nur du-paĝajn) por dua provo interesi la antaŭajn informpetintojn, ĝis tiam ne-aligintajn al kurso.

Samtempe okazis diversaj sendoj de komunikoj al la gazetaro (enpresis ilin ĉefe la Strasburgaj gazetoj "Dernières Nouvelles" kaj "Les Affiches-Le Moniteur"), liverado de 8 libroj "L'espéranto" de Prof. Janton kaj de 9 "Espéranto-Actualités" al la gazerdakcioj.

Ĉu la rezulto de tiel ampleksa agado estis pozitiva? Sajnas aktuale ke ne, sed povas okazi tamen, ke personoj tuŝitaj ĉi-jare de nia informado aliĝos al Esperanto-kurso nur post kelkaj monatoj -aŭ eĉ jaroj- aŭ tute ne aliĝos sed konsistigos favoran grundon, kiu siavice instigos aliajn personojn lerni Esperanton. La plej pozitivaj rezultoj: 12 ĝelernantoj en NITTING, ok lernantinoj en Strasbourg, 16 parolaj ĝelernantoj en NANCY kaj 50 perkorespondaj. U.F.E. mem helpis nin varbi membro-abonantojn, sendante dum tri monatoj "Francan Esperantiston" al 100 personoj (lernantoj aŭ membroj sen abono) kies liston ni starigis dum februaro. Gis nun 4 el tiuj personoj interesiĝis kaj aliĝis kun abono al "FE". Aliaj verŝajne sekvos.

500 propagandiloj "soyez tournés vers l'avenir"	60,00 F
500 propagandiloj "moi j'ai choisi"	30,65 F
dissendo de 200 enketiloj + cirkuleroj + propagandiloj + diversaj afrankoj	18,60 F
8 esperanto "que sais-je" por gazetoj	32,40 F
(7 sendoj je 1,25 F)	8,75 F
stampilo "nous sollicitons votre abonnement"	7,80 F
sendo de 200 cirkuleroj + 450 enketiloj	9,85 F
74 respondoj al inform-petantoj sekve al enketo	22,20 F
33 respondoj al inform-petoj el UFE	9,90 F
eldono de 300 cirkuleroj februaro 74	13,00 F
dissendo de 242 cirkuleroj al informpetintoj	72,60 F
sendo de 9 "esperanto-actualités" al gazetaro + ORTF	1,35 F

sumo	287,10 F

- O -

DUA OPINIO-SONDO

Jen finiĝis nia dua opinio-sondo; ĝi havis malpli da sukceso ol la unua sed tamen la rezultoj estas sufiĉe proksimaj. Oni respondis al la diversaj demandoj jene:

(la unuaj ciferoj indikas la novajn rezultojn, la cifero inter parentezoj tiujn de la unua enketo)

Inter la demanditaj personoj, 79% (84) jam aŭdis pri esperanto, 54% (50) scias, ke ĉiu-jare okazas universala kongreso, sed 85% (91) ne scias, ke oni ludis teatraĵojn en esperanto en Parizo. 14% (10) scias, ke 19 -nun 22- departementaj konsilantaroj voĉdonis rezolucion favoran al la enkonduko de esperanto en la lernejojn, 53% (50) ke esperanto estas la plej facila lernebla lingvo. La lingvo de la Eŭropa Ekonomika Komunumo devas esti esperanto por 32% (30) de la publiko, la angla por 23% (23), la germana por 1% (1), kaj 20% (22) ne havas opinionon.

Fine 64% opinias, ke esperanto devas esti agnoskita ĉe la abiturienta ekzameno, 10% (17) kontraŭas tiun projekton kaj 26% (24) ne havas opinionon.

PROJEKTITA RENKONTIĜO EN BAZELO

La 5an de majo okazis en Bazelo (Svislando) esperanto-renkontiĝo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj. Inter ili ankaŭ troviĝis membroj de nia Federacio. S-r^o Claude GACOND, sekretario de Kultura Centro Esperantista, prezentis al ni ampleksan programon por okazonta "Kultura Semajnfino". Diversaj partoprenantoj akceptis kunlabori ankaŭ nia federacio akceptis peradi por la aliĝ-kotizo el Francio.

Jen kelkaj indikoj pri tiu grava kaj interesa evento:

KULTURA SEMAJNFINO ESPERANTISTA -

Loko: BAZELO (Svislando)

Datoj: 19/20-aj de oktobro 1974

Samtempe disvolviĝos kvar paralelaj programoj. Tiu renkontiĝo kontentigos:

A/ LA ESPERANTISTOJN, kiuj ŝatas aŭdi interesajn prelegojn kaj praktiki la internacian lingvon.

B/ LA ESPERANTO-GELERNANTOJN, kiuj deziras progresi.

C/ LA INTERESUL ON, kiuj ŝatas ekstudi esperanton.

D/ LA GEKNABOJN KAJ INFANOJN. La ĉefprelegisto estos S-r^o Eddy BORSBOOM el Burnik, Nederlando. Li prezentos la personecon, penson, vivon kaj influon de Eugène Adam aŭ "Lanti" en serio da prelegoj.

La detalan prelegon kaj la aliĝ-kondiĉon oni petu al Kultura Centro Esperantista MIEVILLE 133, CH-2314 L A S A G N E (Svislando)

Ne forgesu aldoni internacion respond-kuponon al via peto. Tuj kiam de ĉinitiva programo estos preta, tiam vi ĝin ricevos.

Heinz Dieter Maas (Prezidanto de S.E.L.).....

LA TRIA SEMAJNFINA RENKONTIĜO DE SARLANDA ESPERANTO-LIGO

La 27an/28an de aprilo 1974 Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) okazigis sian trian kulturen semajnfinan kunvenon. Ĝi okazis kiel antaŭe en la naturamika domo de Kirkel., situanta ĉe la rando de arbaro. La kunvenon partoprenis 50 personoj, venintaj el Francio, Luksemburgo, Sarlando kaj el aliaj federaciaj landoj de FRG. La semajnfinaj renkontiĝoj de SEL havas la celon oferti al la Esperantistoj kaj interes ĝantoj kulturen programon, en kies kadro oni plialtigas sian lingvan nivelon kaj konatiĝas kun la Esperanta literaturo. Dum la naciaj lingvoj kaj literaturoj ĝenerale estas instruataj en ŝtatj lernejoj, la Esperantistoj devas mem trovi eblecojn por lingva kulturiĝo.

La pasinta kultura aranĝo de SEL estis senprecedenca en ĝia historio, ĉar neniam antaŭe SEL sukcesis altiri tiom da homoj al Esperanto-kunveno. La kialo por tiu-ĉi favora evoluo estas la celkonscia planado kaj aktiva laboro de la SEL-Sekretario, Reinhard HAUPENTHAL, al kiu grandparte ŝuldiĝas la revekigo de la ligo. Ek de pli ol unu jaro la membroj ricevas la "Cirkuleron de SEL" kaj okaze ankaŭ invitojn kaj atentigojn pri Esperanto-aranĝoj. Tiamaniere membroj kaj simpatiantoj estas informataj kaj volonte akceptas invitojn al kunvenoj, kie ili mem povas konvinkiĝi, ke ESPERANTO valoras seriozan okupiĝon kaj atenton.

La pasinta semajnfina renkontiĝo de SEL komenciĝis sabate post-tagmeze per komuna kaf-trinkado kaj kuk-manĝado, dum kiu la partoprenantoj, kiuj grandparte ne konis unu la alian, povis interkonatiĝi. Post tiu-ĉi agrabla programero, komenciĝis la "laboro" Unua grupo el homoj, ĵus komencintaj lerni Esperanton, daŭrigis siajn studojn sub la faka gvido de Günther BECKER. La aliaj kunvenintoj, jam progresintaj aŭ spertaj en la lingvo, formis grupeton de po kvin-ses personoj kaj klopodis pri tradukoj de sufiĉe malfacilaj tekstoj. Kelkaj tradukis germanajn gazet-artikolojn (ekz-e pri la malpurigo de la Konstanca Lago), ĉe kio evidentiĝis la nescio (aŭ neekzisto) de taŭgaj Esperantaj esprimoj por nocioj, pri kiuj ni legas preskaŭ ĉiutage en nacilingvaj gazetoj. Tamen tiuj malfaciloj ne senesperigis la tradukemulojn, sed tute male spronis ilian eltrovemon, ke oni eĉ devis haltigi ilin antaŭ vespermanĝo! La grupoj, kiuj tradukis el Esperanto en la germanan, spertis similajn komplikajojn ĉe la elekto de taŭgaj germanaj ekvivalentoj. Ili okupiĝis pri tekstoj de Kalocsay kaj Ribillard.

Post tiaj forto-streĉoj la partoprenantoj meritis plaĉan vespermanĝon, kiu inkluzivis krado-rostitan viandon je vere modera prezo. Poste la ĉeestantoj ĝuis prelegon kun diapozitivaj, kiun faris S-r^o Schne der pri migrado tra Palatinato kun grupo de naturamikoj.

Dimanĉe matene oni komencis la tagon per promenado tra la najbara arbaro, kiun gvidis kiel kutime Jakob Michely, kiu, estante naturamiko, konas la regionon "kiel sian poŝon"! Reveninte oni kolektiĝis por vingustumado, aranĝita de Hermann Kiefer kaj Hans Dieter Platz, kiuj ambaŭ estas vinber-kulturistoj. Ĝi tiel babiligis la provantojn, ke oni apenaŭ komprenis sian propran parolon.... 19 diversaj vinoj estis tiel gustumitaj!!

Plua programero estis la prelego de Walter Ehrmantraut (kasisto de SEL) pri la temo "KIO ESTAS INFORMATIKO", en kiu li skizis precipe la perspektivojn de tiu-ĉi nova scienco. Reinhard Hauptenthal, komisiito pri Esperantologio en la universitato de Sarlando, traktis literatur-sciencan temon, referante pri la verkaro de Raymond Schwartz, kies amiko li estis dum multaj jaroj. Kun kelkaj epizodoj kaj anekdotoj el la vivo de tiu-ĉi granda verkisto li sciis spi i sian prelegon, vekante per tio ĉies atenton.

Por la kunveno estis aranĝita libro-stando kun ĉiaspeca literaturo, kie la aĉetemuloj povis kontentigi siajn dezirojn. La ofertitaj libroj de R.Schwartz estis senescepte forvenditaj. La lasta programero de dimanĉo estis la jar-ĉefkunveno de SEL. La partoprenantoj opiniis, ke la sekvanta kultura semajnfino ne plu okazu en Kirkel ĉar la domo estas tro malgranda por tiom da homoj kaj labor-grupoj. La aŭtuna renkontiĝo tial okazos en la tre moderna junular-gastejo de Saarbrücken, dum la printempa kunveno de 1975 havos sian lokon en Homburg/Saar.

Prokrastita pro la balotadoj naciaj ĝi efektiviĝos la 21/22-aj de septembro. Ĉiuj gesamideanoj kaj simpatiantoj estas kore invitataj kunveni agrable kaj enspiri la freŝan kaj sanigan aeron de la arbaro! Kiel jam anoncote en la antaŭa "INFORMILO" oni povas alveni sabaton post-tagmeze.

Jen kelkaj praktikaj memorigoj: *Oni atingas la renkontejon per la RN 59 ĝis LIEPVRE, de tie oni sekvu la RD 48 ĝis Rombach-le-Franc. Meze de tiu vilaĝo oni daŭrigu rekten la vojon al vilaĝeto LA HINGRIE ĝis la kapelo. De tie oni prenu la dekstran vojeton montflanke kaj atingu post 500 m. "La Maison Familiale UFF".*

Vi manĝos kaj trinkos tion, kion vi estos alportinta. Surloke vi trovos ĉiujn ujojn kaj ilojn cele kuiradon kaj manĝadon. Se vi atingos LIEPVRE per trajno vi povos esti transportataj aŭtomobile en la domon... sed anoncu vin sufiĉe frue al S-r° ZIPFEL, 20, rue Labrogue, STRASBOURG aŭ al S-r° REITTER, 24 rue st-antoine, 68660 LIEPVRE.

ĜIS LA REVIDO EN LA HINGRIE!!!

NIA VIVO EN... Strasbourg

S-r° Zipfel gvidis kaj finis E°-kurson en Collège Lucie Berger, kies organizo estis iniciatita de "Association Féminine Sociale du Bas-Rhin" (vangélique) kun la rezultato de 6 diplomitinoj unua-grado:

F-inoj HECHLER (Schiltigheim), JANSEN (Metz), KRAUSE (Morhange), HUSSER (Marlenheim), HUBERT (Lichtenberg), DECOUDUN (Malakoff).

Ekzistos do esperanto-kerno en ne-esperantista organizo, tre sekvinda ekzemplo. Kiam ni sukcesos krei tion similan en Eŭropaj aŭ internaciaj asocioj, kiuj interrilatas internacie?

... Nitting

Novaj Esperanto-kursoj. S-r° Pierre GROSJEAN, instruisto en NITTING (57), kaj nun kunlaboranto de la perkoresponda kurso, gvidas de post marto 2 novajn E°-kursojn (per la "JUNULKURSO de S.A.T.) La unua kurso okazas por 6 plenkreskuloj, la 2-a por 6 geknaboj 11 jaraj.

.... Bar-le-Duc

La 7-gelernantoj gvidataj de S-r° DENIS atingis la finon de la kurso. Ĉiuj petis, ke supera kurso okazu je la proksima lerneja-jaro.

La 30 departementaj konsilantoj ricevis pet-leteron por ke eventuale ili voĉdonu pri dezir-esprimo rilate disvastiĝon oficialan de E°. Ĝis nun la afero ne jam estis pri-traktita en la ordinara sesio.

... Nancy

EKSPOZICIO PRI E° EN LA CENTRA JUNULDOMO Komence de aprilo ni eksciis ke la direkcio de la Centra Junuldomo estis plananta organizon de semajno je "malfermitaj porĉoj" de la 19-a ĝis la 26-a de majo. Ni estis sufiĉe bonŝancaj por povi prezenti, dum tiu tuta semajno, la belan cirkulantan ekspozicion aranĝitan de SAT-Amikaro. Ni reklamis ĝin per kelkaj afiŝoj, bedaŭrinde la gazetaro kvazaŭ ne aperigis niajn komunikojn. Tamen oni povas taksu je 200-300 la nombron de la personoj, kiuj vizitis la ekspozicion. Multaj personoj venis dum tiu semajno por ĉeesti la aliajn aranĝojn (artajn, folklorajn, sportajn, ktp.) de la Junuldomo kaj bona proporcio viziti la ekspozicion lokitan ĝuste en la enirejo.

INFORMKUNVENO PRI E° En la kadro de tiu ĉi-supra evento, ni ankaŭ aranĝis informkunvenon pri E° kaj pri la esperantistaj somerumejoj Primoŝteno kaj Grezijono. Kvankam la gazetaro anoncis tiun kunvenon, neniu nova persono venis, krom deko da esperantistoj kaj gelernantoj.

RILATOJ KUN NIA ĜEMEL-URBO KANAZAWA

De pasinta oktobro ni rilatas, nome de la nanciaj esperantistoj, kun la esperanto-grupo de Kanazawa. Mi ricevis liston de 26 kanazavanoj dezirantaj korespondi en E° kun nancianoj. Tiuj rilatoj anonciataj en komunikoj en la gazetaro fakte kaŭzis la interesiĝon de la regiona televido en Nancy, ĉar dum nia decembra televida intervjuo la unua demando estis: "Vi rilatas per E° kun Kanazawa, ĉu ne?"

Mi raportis al S-r° IVAO KATOO, sekretario de la Kanazawa grupo pri tiuj atingoj. li mem verkis komunikon por sia loka gazetaro. Sekvis gazetara intervjuo, kiu kaŭzis interesigon de la loka televida stacio en Kanazawa. Post interŝanĝo de informoj kaj broŝuroj, ŝajnas ke okazos interŝanĝoj de programoj inter ORTF-Nancy kaj la stacio MRO en Kazanawa. Krome en Kanazawa 8 personoj ensribiĝis por lerni Esperanton, speciale por rilati kun nancianoj. Kaj lastminute la Kazanawa grupo invitas reprezentanton de la nancia esperantistoj al sia urbo, afable proponante pagi parton de la vojaĝkostoj...

Konklude: Samideanoj en iu ajn urbo, kulturu la rilatojn per E° kun viaj ĝemelurboj. Vi memoru, ke vi posedas taŭgan esprimilon por rilati kun iu ajn urbo en iu ajn lando en la mondo, pro tio superu al iu ajn nacia lingvo.
oooooooooooooooo

15a Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)

Organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF), ĝi efektiviĝos ĉi-jare de la 22-a ĝis la 28-a de septembro en MAGLIASO ĉe la bordo de la Lugana-lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano, facile atingebla fervoje aŭ per aŭto. La programo ampleksas gvidatajn kursojn variajn, Esperanto-lecionojn diversgraĉajn vesperajn aranĝojn distrajn.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-r° Ernst Gldttli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH - 5200 BRUGG (Svislando)
oooooooooooooooo

ESPERANTO-MUZEO en HISPANUJO

Okaze de la 26a kongreso de IFEF en Tarragona estas inaŭgurita muzeo, kiu entenas miljn da dokumentoj pri la esperanto-movado de la komenco ĝis nun en ĉiuj partoj de la mondo.

Tiu muzeo havas lokon en granda kaj beleta vilaĝo "Sant Pau d'Ordal", je proksime tridek kilometroj sude de Barcelono. Ĝin realigis samideano Ludoviko Hernandez Izal apotekisto en la vilaĝo.

Partoprenis la inaŭguron pli ol 700 kongresanoj el 17 landoj, kiujn afable akceptis kaj regalas la urbestro. Tio okazis dimanĉon la 12an de majo 1974. Kun tiu de Vieno kaj kun la Centro de Dokumentado de la Chaux-de-Fonds, tiu-ĉi muzeo ebligas la konservadon de dokumentoj tre valoraj por la historio de la esperanto-movado kaj eble de la tuta homaro.

oooooooooooooooo

I.L.E.I - KUNVENO EN HANNUT (Belgio)

Partoprenis 13 ĝinstruistoj el kiuj 2 emeritaj el Francio: M. kaj C. Turin.

Prezidis: Rektoro SONNABEND, prezidento de ILEI
Temo: Samtempa kaj sammetoda instruado de E9 en lernejoj de Nederlando, Belgio, Luksemburgo, O. Germanio, Francio kaj Britio.

Konkludoj: Dezirinde estas, ke tia eksperimento komenciĝu kiel eble plej frue, se eble komence de la nenonta lerno-jaro.

Pro malsimila jkondiĉoj la eksperimento ne povas esti sama, kiel en m ezeŭropo.

Daŭro: 2 jarojn po 1h ĉiusemajne (2 lecionoj)
Aĝo de la ĝlernantoj: 9-11 jaraĵ.
Metodo: "Sub la verda Standardo!" de Korte.

Estus ege utile, se la partoprenontoj kunvenus en Sonnenberg, 17/26 de julio 1974
Por aliĝi, skribu tuj al: Helmut Sonnabend, im ECKERKAMPFELD 11, D 3161 DOLLBERGEN

M.A.C. Edwards, Keble Road 9, GB-MIDENHEAD-BERKS, serĉas lernejon en Francio, kie E° estas instruata al 11/12 jaraĵ geknaboj por korespondado kun sia propra lernejo.

oooooooooooooooo

jen programo, kiu devas logi pli ol unu el ni!
vi petu pliajn informojn kaj aliĝojn al la ĉi-suba adreso:

ESPERANTISTA KULTURDOMO en
KASTELO GRESILLON - 49150 B A U G É (F)

=====

Unua periodo: de la 1a ĝis la 21a de julio.

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAĴNOJ

(kursoj trigradaj, bindado de libroj, korbofarado, konversacio, distraĵoj)
EKSKURSOJ: 10an kaj 17an de julio.

Dua periodo: de la 22a ĝis la 11a de aŭgusto.

INTERNACIAJ SEMAĴNOJ

(temo de la prelegoj: "la homo kaj la maŝino")
EKSKURSOJ: 26an, 31an kaj 7an (ĉi-tiu lasta en aŭgusto)

Tria periodo: de la 12a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro.

STUDESEMAĴNOJ

(sama programo, kiel dum la unua periodo)... lundon 12an: matene, ĝenerala kunveno
vespere, interkona vespero.
EKSKURSOJ: 21an de aŭgusto kaj 28an.

... el nia leterkesto: "... Karaj amikoj, kun granda ĝojo mi ree ricevis la inform-
bultenon, kiun mi tre ŝatas. Bedaŭrinde mi ĝis nun ne povis partopreni viajn aran-
ĝojn. ... inter la 11-a kaj la 17-a de majo mi vizitos la kongreson de IFEF en TAR-
RAGONA. mi treĝojus renkonti samideanojn el via regiono...."

A. HANS D-6735 Maikammer (FRG)

"... Kara samideano, mi estas membro de Jokohama Esperanto-
rondo. kiel sekretario kaj provizora kasisto mi ofte ĉeestas en nia oficejo. ... Ĉu
mi povas aboni vian "INFORMILO-n"? ... mi enmetas 6 respondkuponojn...

K. KARIBE 244 Saido-ĉo, Jokohama 233 Japanujo.

"...Tre estimataj gesinjoroj, La INFORMILO-n mi ege ŝatas
legi interesplene, ĉar ĉiam oni povas lerni el ĉio. Krome mi envias vin pro via
aktiveco, kaj mi gratulas vin per tio kaj deziras al vi riĉan sukceson.

H. SACK D-693 Eberbach a. N (FRG)

"... Dankon por la distra paĝo! Mi sendas miajn solvojn
por pruvi al vi, ke ekzistas personoj, kiuj ŝatas ĝin!...

S-in° OEHRI 67100 Strasbourg (F)

LASTMINUTAJ INFORMOJ

Esperanto-ekzamenoj. Sekve de la esperanto-ekzamenoj, kiuj okazis en NANCY de la
11-a ĝis la 25-a de junio, la jenaj gelemantoj trapasis kaj
sukcesis la ekzamenon de "atesto pri lernado":

F-in° AUBERT M.L.; S-r° BLANKAERT, F-in° BONAVENTURE D. (cito "tre bone"), S-r° COL-
LOMBET J., S-r° DULAC B. (cito "bone"), S-in° DULAC Chr. ("cito bone") F-in°
PETITDEMANGE M.Chr. (cito bone), F-in° VAILLANT fr., S-in° VAN EECKE B.

Nekrologo: Niaj gesamideanoj R. COLIN (Vittel), havis la doloron perdi sian filon
18-an akcidente. La funebra ceremonio okazis la 13-an de junio. Ni prezentas al
la malfeliĉaj gepatroj la esprimon de nia simpatio kaj niajn kondolencojn.

NI DISTRU NIN !



SOLVOJ DE LA ENIGMOJ 5 ("La Informilo" n° 6)

- 1/ "SILAB"-ENIGMO: "ni semas kaj semas konstante" - La ŝlosilvortoj jenas:
njemeno - infarkto - sensitivo - elektanto - modo - abono -
sekstanto - kantiko - alianco - jaune - sekto - empeno -
- 2/ KRUCVORTOJ: aplaŭdoj - re - bn - ku - orto - kub - forpeli - fortikul -
iri - osme - etno - io - r - opres -
- 3/ "ABIOLUDO": *pro bedaŭrinda presapero (malĝusta difin-listo estis donita al la tajpistino) la ludo estis parte nesolvebla!*
jen la vortoj: sabato - abonis - tasego - torino - resono - aserti - aborti - senigi - agente - galero - rediri - perino - sporad' - radare - martir' - titoli - trofeo - ignori - gingiv'

"SILAB"-ENIGMO * ...

ap - bi - ci - e - eĝ - el - ep - ep - et - fa - fe - fo - ga - gn - go - i - i -
i - ik - il - in - jo - ko - lĉ - li - lim - me - ni - o - o - o - o - og - og -
om - or - or - os - ra - ra - re - ro - ro - se - te - to - to - us

El la ĉi-supraj "silaboj" alfabete ordigitaj vi konstruu vortojn laŭ la ĉi-subaj donitaj difinoj. La UNUA kaj KVARA literoj de ĉiu vorto, legataj de supre mal-supren elformas proverbon .

- | | |
|----------------------|----------------------------------|
| 1 + - - + - - | metalajo |
| 2 + - - + - - - | postpensoj de la aŭtoroj |
| 3 + - - + - - - - - | blanka globulo |
| 4 + - - + - - | flaumalsano |
| 5 + - - + - | volba spaco |
| 6 + - - + - - | trajektorio de korpo |
| 7 + - - + - - | detranci herbon |
| 8 + - - + - - | nescio |
| 9 + - - + - - | la rakonta poezio |
| 10 + - - + - - - | plezurige trakti iun per manĝaĵo |
| 11 + - - + | malhelpi ies movojn (inverse!) |
| 12 + - - + - - - - - | instrumento por mezuri angulojn |
| 13 + - - + - - | plifortigi per sia aŭtoritato |
| 14 + - - + - - | kaosa amaso da glacieroj |
| 15 + - - + - - | franca departemento |

KIO ESTAS TIO ? *

- 1/ mia unua signifas deponi (radik.)
per mia dua oni alvokas malproksiman konatulon
mian trian oni ludas sur scenejo
mia kvara estas scienca sufikso

al mia tuto oni sin interesas ĉefe dum la feritempo!

- 2/ mia unua estas interjekcio
mia dua estas prefikso por neŝateco
per mia tria finiĝas longdaŭra ludparto


al kolekta hobia sin dediĉas mia tuto

TRIANGUL-VORTOJ

n e - - - - -
 - n e - - - - -
 - - n e - - - - -
 - - - n e - - - - -
 - - - - n e - - - - -
 - - - - - n e - - - - -
 - - - - - n e - - - - -
 - - - - n e - - - - -
 - - - n e - - - - -
 - - n e - - - - -
 - n e - - - - -
 n e - - - - -

lasi ne farita
 senigi je la sentokapablo
 parto de la gramatiko
 helpantoj en kafejoj
 perdi siajn originajn kvalitojn
 eta saltanta mamulo (radik.)
 meminciato
 malafableco
 laborejo de kuracisto
 frukto de sovaĝa arbeto
 kristano kiu konvetiĝis al islamo
 historieto
 arta kaiĉuko, polimero de klorbutadieno

abio-ludo *



KLARIGOJ: ekirante el la centro (signita per la litero "k") vi plenigu la aliajn ĉelojn pere de la donitaj difinoj. Vi uzu ĉiujfoje du jam eltrovitaj literoj. Vi povas rondiri dekstre maldekstren aŭ inverse, kaj komenci je iujajn angulo.

1/ organo, kies ekscizo respondas, ĉe iaj triboj, al la vira circumcido.

- 2/ oksido de certaj metaloj
- 3/ latina virnomo
- 4/ serpento
- 5/ juvelŝtono
- 6/ dolĉa manĝaĵo entenanta avenan

grion

- 7/ saltanta insekto
- 8/ unua nuka vertebro
- 9/ limfoida formaĵo en la digesta tubo

- 10/ kontraŭstaro
- 11/ alfluas en Donon
- 12/ jarparto

13/ specio de eta mamulo el la subordo de la neparhufuloj

14/ plata parto de remilo

15/ domicilio

16/ resuma millongigo de libro

17/ agi kun iu tro kareseme

18/ vigla muzikaĵo

19/ aranĝata kun pompo

ĈIUJ SOLVOJ APEROS EN LA VENONTA "INFORMILO"

Imprimé par les soins du Secrétariat des Associations", 12 rue Voltaire, BAR-le-DUC.

Le Directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT - Dépôt légal 245